

Theodor Storm,
Konscias mi pri l' tempoflu'

tradukita de Manfredo Ratislavo

Konscias mi pri l' tempoflu',
Ke devos mi forlasi vin,
Ke kantos lastan kanton mi,
Ke venos lasta kis' je l' fin.

Ankoraŭ mi ĉe via buŝ'
Avide-time pendas mi;
La lastan kison de l' junec'
La lastan rozon donas vi.

Al mi el jen sorĉ-kalik'
Enverŝas lasten gluton vi;
Vi estas de l' fabelo-mond'
Vespera lasta lum-radi'.

Sur la ĉiel' la lasta stel'
Vi estas kvazaŭ ja por mi;
Ne retenigu via kor',
Feliĉo lasta estas vi.

Sentigu foje vi al mi,
Maperonta en malhel',
La plenan senton de la viv'!
Subigu poste mia stel'.

*Traduko de la Germana poemo "Wohl fühl ich , wie das Leben rinnt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, *1817-09-14 - †1888-07-04) en la Germanan de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2002-04.*

MR-388-1 / Arg-201-399 (2004-03-06 06:50:54)

Mi trovis tiun chi poemon en la libro „Theodor Storm - Werke“ eldonita de la eldonejo Droemersch Verlaganstalt München por la Germana Libroklubo (Deutscher Buchklub Bochum) el la jaro 1954.